

KRISTNASKO

Neĝas nun ĉie ĉi

Neĝas nun ĉie ĉi,
lagon kovras glaci',
brilas kristnaske arbar'.
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Varma estas la kor',
malaperas dolor',
venas savant' de l' homar'.
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Malleviĝis la sun',
sankta nokt' estas nun,
kantas por ni anĝelar'.
Ĝoju vi, ho kristanar'!

(Leise rieselt der Schnee)

Verkita de Eduard Ebel (1839 - 1905).

Esperantigis: Manfred Retzlaff (Manfredo Ratislavo)
en decembro de 1982 laŭ la origina germanalingva teksto.

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun
UEA

*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH
Heemskeerck ☎+31 251 231941;
✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎+31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074
Heilbronn, Germanio; ☎+49 7131 162688;
✉ SLKruieger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimume €20,- ☉ Membro-subtenanto
€30,- ☉ Nura abono: pagante rekte al KELI
€16,- ☉ pagante al Libroservo €18,-. Sendo
de okcidentaj monbiletoj per registrita letero
al la kasisto de KELI ☉ Se estas en via lando
UEA-poŝtĝirkonto (informigu ĉe UEA)
bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p**
de KELI ☉Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI:
5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumona revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenot, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎+33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al
la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun
reproso aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎+4832 2650038; ✉ esperanto@hejme.e-tools.pl

ENHAVTABELO

123 Pri la naskiĝo de Jesuo

124 Jesuo en la Apokalipso

126 Agado E3 kaj la sekvo

132 Baldaŭa kaj antaŭa kongresoj

138 Indekso 2002

REDAKTORAJ VORTOJ

Plej bonajn festotagojn mi deziras al vi
ĉiuj.

Kompreneble al vi mi deziras bonan novan
jaron. Sed, ni neniam devas forgesi ke ĝuste en
tiu periodo la kristanoj en la tuta mondo fe-
stas la venon de nia Sinjoro kaj Savanto al nia
mondo, en la formo de juna homo. Kvankam
ni tute ne scias en kiu periodo Jesuo naskiĝis,
ni ne devas preterlasi la fakton, ke tiu nun tre
komerca festo estas por ni unue la rememoro
de la plej bona novaĵo al la Mondo: Dio amas
la mondon.

Ĝi numere kelkaj paĝoj pri Jesuo.

Mi volas diri al kelkaj kontribuintoj, ke ni
bone ricevis iliajn tekstojn, ke ni ne rifuzis ilin,
sed ke feliĉe nuntempe ni havas materialon en
sufiĉa kvanto. Tamen, ne ĉesu la alfluon, ĉar
tiu grandioza periodo eble baldaŭ finiĝos, kaj
tiam ni estos kontentaj havi rezervon. Mi volas
citi: krom Jacques TUINDER, bone uzata en ĉi
tiu numero, ankaŭ Oshó-Davies, Olúwábùnmi
Gabriel, Philippe DE VOS, FARKAS Éva, Edwin
HARLER, kaj ankaŭ aliaj.

En pluraj eŭropaj landoj, 2003 estos la jaro
de la Biblio. Mi ripetas mian alvokon al artikoloj
pri tiu temo. Ĝi estas la fonto por ekiĝo kaj
edifo de nia spirita vivo.

Denove, plej korajn bondezirojn.

Philippe COUSSON

Kie naskiĝis Jesuo el Nazareto?

Mi kelkfoje legis, ke la scienca teolo-
gio de la universitato estus danĝera por
la persona kredo. Mi mem, studanto de
teologio, havas kontraŭan sperton, ja po-
vas diri, ke scienca studado povas helpi
al la persona kredo.

Mi en tiu artikoleto volas montri al vi,
kion modernaj sciencistoj supozas pri la
naskiĝloko de Jesuo. Do: kie naskiĝis nia
Mesio?

Pri la infan tempo de Jesuo ni scias
preskaŭ nenion. Paŭlo kaj la ceteraj
skribantoj de la leteroj de la Nova Testa-
mento havis neniun intereson pri ĝi kaj
ne donas al ni informon. Ankaŭ la plej
malnova evangelio, tiu laŭ Marko, skri-
bita ĉirkaŭ la jaro 70 p. K., kaj la Evange-
lio laŭ Johano nenion diras pri la tempo
antaŭ lia publika predikado.

Restas la evangelio laŭ Mateo kaj la
Evangelio laŭ Luko. Ili ambaŭ en la unu-
aj du ĉapitroj raportas pri la infan tempo
de Jesuo. Interalie ili ambaŭ prezentas li-
ston de la prapatroj de Jesuo, rakonton
pri la naskiĝo kaj ĝiaj cirkonstancoj kaj
diras, ke li naskiĝis en Betleĥemo, vilaĝo
10 km sude de Jerusalemo.

Tamen inter la rakontoj estas gran-
daj diferencoj: laŭ Mateo lia familio jam
antaŭ lia naskiĝo loĝis en Betleĥemo, kaj
poste fuĝis pro la kruela reĝo Herodo la
Granda al Egiptio. Post lia morto ili ne
kuraĝis reveni al la hejmloko, ĉar la sa-
me kruela filo Arĥelao ekregis tie. Nur
tial ili translokiĝis al Nazareto en Gali-
leo. Sed ja ankaŭ tie regis filo de Herodo
la Granda: Antipas!

Laŭ Luko la familio venis de Nazare-
to al Betleĥemo, ĉar ili devis registri sin

kune kun la tuta mondo pro dekreto de
la romia imperiestro Aŭgusto. Kaj tial ili
migris en la urbon de iliaj prapatroj, al
Betleĥemo, kie naskiĝis ilia prapatro, la
reĝo David. Post tiu registrado kaj post la
naskiĝo ili simple revenis al Galileo.

Sed rilate al tiu registrado estas kelkaj
historiaj problemoj: registrado ĉiam oka-
zis en la loĝloko, ne en la loko, el kiu de-
venis la prapatroj! Krome la registrado,
pri kiu Luko rakontas, ne estis tutmon-
da, sed nur okazis post la ekzilio de la
tro kruela Arĥelao per la romia imperie-
stro Aŭgusto en la jaro 6 post Kristo kaj
nur en la eksa teritorio de Arĥelao Ju-
deo, Samario kaj Idumeo. Jesuo verŝajne
jam naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 6 antaŭ Kri-
sto, almenaŭ antaŭ la morto de Herodo
la Granda en la jaro 4 a.K. Alivorte Lu-
ko verŝajne intermiksas la datojn kaj per-
sonojn.

Pro tiuj kaj aliaj problemoj, la pli-
multo de la sciencistoj opinias, ke Je-
suo naskiĝis en Nazareto. Ilia argumen-
to estas, ke en ĉiu Evangelio kaj en „la
Agoj de la Apostoloj” Jesuo havas la no-
mon „Jesuo el Nazareto” kaj ne „Jesuo el
Betleĥemo”. Krome la aŭtoro de la Evan-
gelio laŭ Johano opinias, ke Jesuo ne estas
el Betleĥemo. Ekzemple en la 7a ĉapitro,
versikloj 40 ĝis 52, li rakontas, ke homoj
rifuzis lin kiel Kriston / Mesion, ĉar li ne
estas el Betleĥemo kiel David.

Do Jesuo verŝajne naskiĝis en Naza-
reto.

Sed kial tamen Mateo kaj Luko opi-
nias lin Betleĥemanon? La kristanoj kre-
dis kaj ni kredas ĝis hodiaŭ, ke Jesuo es-
tas la Savanto de la mondo. En la tem-

po de Jesuo pri tiu „Mesio” (tio estas en la greka lingvo „Kristo”) svarmis multaj ideoj. Unu estis, ke la Kristo estos ido de la glora reĝo David. Kaj tiu ja naskiĝis en Betlehemo en Judeo. Do kial ne ankaŭ la Kristo, ido de David, estu naskita en Betlehemo?

Ĉar la Kristanoj sciis, ke Jesuo estas la Mesio, kelkaj kiel Mateo kaj Luko konkludis, ke li estas samkiel David el Betlehemo. Sed fakte la demando pri la vera naskiĝloko estis tiutempe tre, tre malgrava, nur la prediko kaj publika agado de Jesuo estis por la kristanoj grava. Tial ekzemple Marko tute ne parolas pri la tempo antaŭ la bapto de Jesuo, nur pri la posta aktivado kaj predikado.

Kion ni kristanoj hodiaŭaj nun faru? Ĉu la rakontoj pri la naskiĝo de Jesuo nun estas senvaloraj por ni modernaj homoj? Ne! Tion, kion ili volas klarigi al ni pri Jesuo, kongruas kun la mesaĝo de la evangelioj: Jesuo estas la Kristo por la homoj, ankaŭ por tiuj, kiuj estas for de dio. Tial Luko rakontas, ke la anĝeloj unue informas la paŝtistojn, kiuj estis malestimataj de la aliaj homoj. Tial Mateo rakontas, ke Jesuo kun sia familio devas fuĝi al Egiptio kiel hodiaŭ azilpetantoj fuĝas al sekura Eŭropo. Tial Mateo nomas la „saĝulojn”, kiuj sekvas la stelon al la infano, per la greka vorto „magoi”, do magiistojn kaj fakulojn pri la astrologio (el la persa kulturo). Ĉar Jesuo volas repacigi homojn inter si kaj kun Dio, eĉ tiujn, kiuj erare pensas, ke la steloj aŭ iu moderna ideologio gvidas al homa feliĉo.

La rakontoj havas gravan kaj veran mesaĝon, multe pli gravan ol la pure historieca demando pri la historia naskiĝloko de Jesuo el Nazareto.

Rohloff

LA PRISKRIBO DE JESUO EN LA APOKALIPSO

Kaj meze de la sep lampingo, iun similan al la Filo de homo, vestitan ĝis piede, kaj zonitan ĉirkaŭ la brusto per ora zono. Kaj lia kapo kaj liaj haroj estis blankaj kia blanka lano, kia neĝo; kaj liaj okuloj estis kia fajra flamo; kaj liaj piedoj estis kia brilanta latuno, kvazaŭ rafinita en la forno; kaj lia voĉo estis kia voĉo de multaj akvoj. Kaj li havis sia dekstra mano sep stelojn kaj — kaj el lia buŝo eliris akra dutranĉa glavo kaj lia aspekto estis tiu de la suno brilanta en sia forteco

(Apo 1:13-16)

vestitan ĝis piede

se almenaŭ, vestite, ni ne estos trovataj nudaj. (2 Kor 5:3)

Jesuo havas la savon, ĉar li plenumis la volon de Dio.

zonitan ĉirkaŭ la brusto per ora zono

La maŝortuloj zoniĝas per forto (1 Sam. 2:4)

La ligilojn de reĝoj Li malligas, kaj Li ligas per zono iliajn lumbojn (Ijobo 12:20)

Li... malfirmigas la zonon de potenculoj (Ijobo 10:20)

Vero estas la zono de lia lumbo, kaj fideleco la zono de liaj koksoj (Jesajo 11:5)

Staru do, ĉirkaŭzonite la lumbojn per vero (Efe 6:14)

por ke la flikado de via fido, pli multavalora ol oro (1 Petro 1:7)

Jesuo havas la forton, la veron, la fidelecon.

Kaj lia kapo kaj liaj haroj estis blankaj kiel blanka lano, kiel neĝo

Se viaj pekoj estas sangoruĝaj, ili iĝos

blankaj kiel neĝo; kaj se ili estas kiel skarlatano, ili iĝos kiel lano. Jesajo 1:18

Jesuo estas pura, sen peko

liaj okuloj estis kiel fajra flamo

Mi bruligos fajron en vi, kaj li formanĝos ĉunverdajn arbojn kaj sekan arbon. (Ezekielo 21:3)

Jesuo juĝos ĉiujn pekojn

liaj piedoj estis kiel brilanta latuno, kvazaŭ rafinita en la forno

Kaj Mi rompos vian fieran obstinecon, kaj Mi faros vian ĉielon kiel fero kaj vian teron kiel kupro. (Lev 26:19)

Jesuo prenis la juĝon de niaj pekoj sur sin

lia voĉo estis kiel voĉo de multaj akvoj

Gentoj bruas simile al la bruado de grandaj akvoj; sed Li minace ekkrios al ili, kaj ili forkuros malproksimem, kaj ili estos pelataj, kiel grenventumaĵo sur la montoj estas pelata de la vento, kaj kiel polvo estas pelata de ventego (Jesajo 17:13)

La granda malĉastistino, kiu sidas sur multaj akvoj (Apo 17:1)

Jesuo alvokis multajn Kristanojn al si

li havis en sia dekstra mano sep stelojn

La sep steloj estas la anĝeloj de la sep eklezioj (Apo 1:20)

Kaj la klerigantoj brilos, kiel brilo de la ĉielo; kaj la virtigantoj de multaj <brilos>, kiel steloj por ĉiam kaj eterne. (Daniel 12:3)

Jen la suno kaj la luno kaj dek unu steloj kliniĝis antaŭ mi. (Gen 37:9)

Jesuo gvidas la ekleziojn kaj ties gvidantojn

el lia buŝo eliris akra dutranĉa glavo

Ĉar la vorto de Dio estas viva kaj energia, pli akra ol ĉia glavo dutranĉa.

AMA OPINISONDO

Interreta opinisondo, supoze de la *American Medical Association* (Usona Medicina Asocio) donas la jenajn statistikojn:

1. La Japanoj manĝas tre malmulte da graso kaj havas malpli da koratakoj ol aŭ Britoj aŭ Usonanoj, sed inverse la Francoj manĝas multe da grasajoj kaj ankaŭ havas malpli da koratakoj ol aŭ Britoj aŭ Usonanoj.

2. Japanoj trinkas tre malmulte da ruĝvino kaj havas malpli da koratakoj ol aŭ Britoj aŭ Usonanoj, Italoj trinkas tre multe da ruĝa vino kaj havas malpli da koratakoj ol aŭ Britoj aŭ Usonanoj.

La konkludo de la opinisondo estas, ke kion oni manĝas aŭ trinkas ne mortigas vin, sed la parolado de la angla lingvo.

El la Interreto tradukis Ed HARLER

Ĉu vi rimarkis ke estas tre malmulte da ĉapelitaj literoj? Tre surprize, ĉu ne?



(Heb 4:12)

Jesuo diras la vorton de Dio, kiu montras, kia estas la koro de la homo

lia aspekto estis tiu de la suno brilanta en sia forteco

Sed por vi, kiuj respektas Mian nomon, leviĝos suno de justeco, kaj sanigo estos en ĝiaj radioj, kaj vi eliros kaj saltados, kiel bone nutritaj bovidoj (Mal 4:2; Mat 13:43)

Sed Liaj amatoj estu kiel la leviĝanta suno en sia potenco. (Juĝistoj 5:31)

Ĉar Dio, la Eternulo, estas suno kaj ŝildo (Ps 84:11)

Jesuo estas Dio.

Philippe DE VOS

INTERNACIA KAMPANJO POR SOLIDARECO KUN BLINDULOJ

Agado E3 naskiĝis en 1966. Ĝin iniciatis s-ano Jacques TUINDER rezulte de informado flanke de nederlanda Fondaĵo Prof. D-ro H.J.M. WEVE, kies tiutempa celo estis adoptigi operacieblajn blindulojn en Orienta Afriko. En novembro 1966 li alvokis la esperantistaron kunlabori por „esperigi esperantojn”. Kaj post tio la simbolo E3 fariĝis vaste komprenata kaj konata.

E... estas esperantisto, uzanto de la lingvo de D-ro ZAMENHOF

E... estas esperigi

E... estas blinda aŭ okulmalsana kunfrat(in)o, homo ne vidanta sed esperanta (re)akiri vidpovon.

Agado E3 celas montri efektivan solidarecon kun homoj blindaj kaj malforte vidantaj laŭ la spirito kaj ekzemplo de D-ro L.L. ZAMENHOF.

Agado E3 forte batalas kontraŭ fenomeno absurda: milioj da homoj vivas inter ni, kiuj estas senbezone, nenecese, eviteble vidhandikapitaj. Ni povus ilin (re)doni vidkapablon, se ni vidus ilin kaj ilian sorton.

Aktie ZIENDEROGEN (internacilingve Agado EVIDENTE)

Aktivinte dum preskaŭ tridek unu jaroj kiel privata persono, kiu ĉion faris proprakoste en sia libera tempo, finfine — la 30-an de septembro 1996 — Aktie ZIENDEROGEN (internacilingve Agado EVIDENTE) fariĝis oficiala kaj notarie registrita fondaĵo. Felice ankaŭ la nova nomo instigu esperantistojn kunagadi, ĉar ĝi entenas denove la 3 literojn E: E-vid-E-nt-E!

(Naŭ el dek helpantoj de Jacques TUIN-

DER parolas aŭ almenaŭ komprenas lian gepatran lingvon. Tio finfine estis la kaŭzo, ke la eksa E3-agado baptiĝis per pli komprenebla nederlandlingva nomo ZIENDEROGEN (= EVIDENTE). E3 ja evidente estas enigma volapukaĵo por ĉiu nederlandano neesperantista!)

VERA KAJ JACQUES TUINDER

Ili ambaŭ emeritiĝis kaj nun gevolontulas, kvankam sur malsamaj terenoj.

VERA

estas aktiva joko instruistino, servas al plijaraĝaj kaj gravedulinoj, kaj estas aktiva en porvirina pacomovado kaj la ekumena bazogrupo, al kiu apartenas la edzoparo.

JACQUES

dum du tagojn semajne li libervole deĵoras en benediktana monaĥejo, kie li aktivis kandelfariste, pordiste, kunkuirante, gastigante ktp. Ankaŭ aliloke li servas volontule, nome en ekologia bonfara revendejo kune kun la organizaĵo „Sovaĝaj Anseroj”, la plej granda sponsoro de ‘Evidente’, kiun li 1966 iniciatis kaj la lastajn jarojn prezidis.

1990 laŭ decido de UEA li ricevis la premion Onisaburo Deguĉi kiel fondinto kaj motoro de la Agado E3.

1998 per la kavalira ordeno „Ridder in de Orde van Oranje Nassau” li estis honorigita.

AMBAŬ geavas trifoje.

NUNAJ PROJEKTOJ: en Albanio (instituto por blindaj infanoj); en Bulgario (rekapa-

bliga centro por vidhandikapuloj kaj laborejo por mebloriparado; Srilanko (helpo al du blindulejoj kaj al optikejo). Por Tajlando ekzistas planoj por maljunulejo por vidhandikapuloj kaj profesiiga (mezgrada) lernejo por geknaboj blindaj kaj malforte vidantaj.

AKTUALE: vizito kun du optikistoj al la ekonomie plej malria lando de Eŭropo, Moldavio (17–28 septembro). Ni helpas al centoj da infanoj kaj maljunuloj per okulvitroj kaj sponsoros operacion de 110 pacientoj, kies nomoj troviĝas sur listo ricevita de la Asocio de blinduloj en la ĉefurbo. Unu operacio kastos ĉ. 200 eŭroj.

En preskaŭ ĉiuj evolulandoj ekzistas enorma problemo: blindeco. Temas pri 40 milionoj da blindaj homoj, el tio 80% en la tria mondo. La blindeco de tri el kvar blinduloj estas evitebla, t.e. preventebla (ekz. per havigo de A-vitamins) aŭ kuracebla (ekz. enplantaĵo de artefarita lenso ĉe kataraktulo).

Ni Esperanto-amikoj ofte plendas pri blindeco flanke de la mondo rilate al nia celo, ke la homaro apliku komunan duan lingvon por egalrajte partopreni la mondvestan komunikadon kaj kulturon. Ĉu ni povas permesi al ni blindecon de la koro, se temas pri evitebla blindeco de la okuloj? Cetere la farita praktika helpo estas bona propagando por Esperanto!

Stichtung Zienderogen

Tel. kaj faksilo: +31 (0)251231941

Henegouwenlaan 35

retpoŝto:

d.tuinder-dekker@wolmail.nl

NL-1966 RH Heemskerck

Poŝtbanka konto: 10.20.100

UEA-konto: jajt-s.

Karaj gefratoj,

Hieraŭ mi ĉeestis la oficialan malfermon de la 11-a Mondkonferenco, kiun organizis ICEVI, la Internacia Konsilantaro pri Edukado al Vidhandikapuloj. Fluis al unu el la plej modernaj kaj tre lukse ekipitaj kongresejoj en nia lando pli ol 800 partoprenantoj el 102 landoj. Du el ili, homojn el Moldavio, invitis Fondaĵo Evidente. Estis interese vidi, kiel oni solvis la lingvan problemon. Nu, ŝajne ne ekzistis tiu problemo ĉar kiel nura lingvo hegemoniis la angla... Abundis privataj interpretistoj en la salono; en multaj lokoj oni povis observi (kaj aŭdi!!) la fluŝradon de ies buŝo en najbaran orelon! Eble duono ne sukcesis sekvi la uverturan ceremonion.

Por mi estis tre valore viziti la kongreson, ĉar mi povis konatiĝi kun miaj moldavaj gastigantoj, kiam mi la 17-an de septembro venonta kun du optikistoj-optometristoj flugos al tiu lando por okulvitre helpi al centoj da malriĉaj homoj, unualoke infanoj kaj maljunuloj, kies vidpovon ni esperas pliakrigi. Mi vidis liston de 110 operacieblaj okulpacientoj, al kiuj la Ligo de Vidhandikapuloj ne kapablas adekvate helpi pro manko de mono.

„Ĉu via organizaĵo pretus adopti ilin?” La totalaj kostoj sendube estos pli ol 15.000 eŭrojn. Kiu helpas al ni efektiviĝi ĉi tiun novan adoptan agadon? Kiu el ni estas preta sponsori manĝon en unu el la hejmoj, en kiuj ni trioje laboros? Kiu el ni estas preta pagi unu aŭ du aŭ plurajn optikajn, ofte altdioptriajn, vitrojn? Nia ‘jeso’ estas rekta konsekvenco de tiurilata rezolucio dum la unua ekumena kongreso, okazinta en Limburg/Lahn (1968).

Ĉijare ni povas paroli pri denova kul-

EVIDENTE—Prezidanto en Moldova malliberejo!

Ne malofte mi komencas iuspecajn artikolojn per la emocia konstato: „Sen Esperanto mi ne estus ĉi tie!” Nu, sen la bona lingvo, kiun la bonkora kaj akre vidanta okulisto D-ro L.L. ZAMENHOF donacis al la homaro, mi ne estus vizitinta la ekonomie plej malfortan landon de Eŭropo.

Nelonge antaŭ mia foriro najbarino demandis al mi: „Kiam vi intencas vojaĝi al Mongolio, Jacques?” Mi kuraĝas aserti, ke unu el du mialandanoj neniam aŭdis pri tiu lando kaj sekve ne povus trovi ĝin sur mapo... Al multaj mi starigis ankaŭ jenan demandon: Ĉu vi eble scias, kio estas la ĉefurbo de Moldavio? Neniu divenis la ĝustan respondon. Kaj

mino por nia organizaĵo, ĉar ni oficiale malfermis belegan lernejon kun internulejo por tamilaj infanoj vidhandikapitaj en Batticaloa (Srilanko).

Dua projekto temas pri tio, ke ni nune estas riparantaj la Rekapablighan Centron en Bulgario kaj jam komencis instali melioriparejon, ankaŭ en la urbo Plovdivo. Dank'al forta helpo flanke de Organizaĵo „Sovaĝaj Anseroj”.

En la konferenco, pri kiu mi supre parolis, mi havis interparolon kun la (blinda) direktorino de granda blindulejo en Pattaya (Tajlando). Jam iom da tempo mi korespondas pri ŝia peto helpi al la realigado ĉu de profesiiga lernejo ĉu de hejmo por sentegmentaj altaĝaj blinduloj.

Tre karaj geamikoj, ĉu vi scias ke inter ni vivas 15.000.000 vidhandikapitaj infanoj? Kaj ĉu vi scias, ke al 90% el ili man-

la ĝusta respondo estas: Kiŝinevo.

Okaze de la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj IKBE, en 2000 okazinta en la bulgara urbo Plovdivo, mi konatiĝis kun esperantistino el Moldavio. Poste amikaj organizaĵoj informis min pri tio, ke ili iniciatas projektojn por vidhandikapuloj en tiu lando. Tuj kreskis mia interesiĝo. Sekvis invito flanke de la Asocio de Nevidantoj. Sekvis la luksa cirkonstanco, ke du optikistoj, Henk BERTENS kaj Wim SCHOUTEN, pretis akompani min por mezuri okulojn de la plej malriĉaj el la malriĉuloj.

La 17an de septembro aviadilo sekure kaj komforte flugigis nin al la ĉefurba

kas la ebleco frekventi lernejon? Nu, la estraro de ICEVI faris strategian planon tre ambician: en 2015 neniuj blindaj infanoj estu senigita de instruado!

En la lando, kie ni nune konferencas, okazis ankaŭ la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE). Al kvin partoprenintoj nia fondaĵo ebligis aliĝi, ĉar la ŝlosilvortoj de E-VID-E-NT-e evidente estas kaj espereble restos solidareco kaj amikeco.

Estas granda diferenco inter la impona ECEVI-kongreso, kiun registaroj kaj riĉaj organizaĵoj sponsoras, kaj nia tre modesta konferenco. Sed ni estas ĉiuj egalrajtaj rilate al la kongreslingvo. Ĉu ne ĉiu el ni ĝin devis lerni? Por ĉiu el ni ĝi estas bona lingvo, nia dua lingvo. Sed ni neniam forgesu, ke ĝin kreis okulisto. D-ro ZAMENHOF ĉiam estis preta helpi eĉ al la plej malriĉaj okulpacientoj kaj vidhandi-

aerhaveno, kie nin bonvenigis estraranoj de la porblindula asocio kaj Elizabeto, nia anglalingva interpretistino. Blinda nia, Esperanton parolanta, kontaktpersono tute neatendite devis ekzorgi pri subite grave malsaniĝinta patrino; ŝi konsekvence devis cedi sian taskon al alia! Nu, Elizabeto, kaj ankaŭ aliaj kiujn ni renkontis, dum kontaktoj kun kelke da esperantistoj, spertis la praktikan utilon kaj promesis tuj lerni la internacian lingvon. Ĝi estas ege bezonata en lando trilingva (rumana, ukraina kaj rusa), en kiu homoj nur esceptege regas la anglan!

La triopo laboradis dum longaj tagoj en la oficejo de la asocio, en sociala entrepreno por vidhandikapuloj, en lernejoj por infanoj blindaj kaj malforte vidantaj, ktp. Ĉar mi mem, dum mia profesie ak-

kapuloj. Ĉu ne estus bela ideo daŭrigi lian laboron en landoj ekonomie postrestintaj, kie la bezonoj estas tiom grandaj, jes nur kreskas kaj kreskadas?

Hodiaŭ mi ricevis dankleteron de afabla okulistino en Krimeo (Ukrainio), laboranta en sociala entrepreno, kiun optikisto Croese kaj mi pasintjare vizitis. Ni sendis al ŝi oftalmoskopon, kiu multege servas al ŝi ĉiutage. Dume partnera organizaĵo helpas al bulgaraj okulistoj per instrumentoj. Vi sciu, ke ĝenerale Esperanto ludas gravan rolon en tiaj kontaktoj!

Ke nia solidareco estu (kongresa temo!), kiom eble, senlima.

Plej kore vin kaj la viajn salutante, mi dankas al vi, Esperantistoj, en la nomo de ĉiuj, kiuj Esperas, ke ni ankoraŭ ĉiam Esperigas ilin, t.e. gefratojn Esperantajn rricevi vidpovon aŭ pli akre vidi!

Jacques TUINDER

tiva vivo, social-helpiste deĵoris en malliberejoj kaj flegejoj por psike malsanaj krimuloj, mi kadre de miaj misioj ĉiam penegas enpenetri punejojn por solidari kun enkarcerigitaj laŭ la vojo de havigo de okulvitroj kiel videbla kaj tre konkreta 'veturilo'. En la komenco la Ministrejo pri Justico rifuzis doni permeson, sed finfine ĝi — kun konstateblaj rezervojoj kaj antaŭjuĝoj — allasis nin en unu el la plej severe gardataj prizonoj de Moldavio, en kiu kunpremiĝas preskaŭ mil kompatinduloj. Komence la sinteno de la mallibereja dungitaro estis malvarmeta, indifera kaj distanca, sed iom post iom ĝi evoluis al kompreno kaj akcepto, jes eĉ ekamikeco! Ni jam en la unua momento invitis uniformitajn personojn, el kiuj plurajn ni povis helpi per okulvitroj por legado aŭ por malproksimo. La malliberuloj ĝenerale estis afablaj, kaj kelkaj eĉ portis donaceton por montri sian dankon. En la unua tago ni ricevis eĉ ne panon kaj akvon, la normalan menuon en tiuspecaj domegoj, sed antaŭ nia foriro gardistoj alportis teon, dolĉaĵojn kaj kukojn. Oni eĉ ofertis bonguste preparitan varman tagmanĝon...

Du tagojn antaŭ nia forveturo la Justicministro persone petegis al la prezidanto de la Asocio de Nevidantoj, s-ro Dumitru Scifos: „Ĉu tiu triopo bonege servinta ne pretus viziti ĉiujn niajn malliberejojn?” Ni diris jes, sed tio ne eblas sen multaj novaj sponsoroj.

Konklude direndas, ke mi vojaĝis kun du tre motivitaj, lertaj kaj sindediĉaj specialistoj, por kiuj neniuj peto tro multis, neniuj tasko tro pezis. Ni vidis plurajn nefake operacitajn okulojn kaj sponsoris operacion al kelkaj okulpacientoj favorprognozaj. La triopo ĉiutage spertis la kuraĝigan afablecon kaj varmigant

ILI FARAS PILKOJN KAJ TAMEN NE POVAS FUTBALI...

En la momento, kiam mi verkas ĉi tiun artikolon, neniu konversacia temo estas tiom aktuala, grava kaj ofta kiom futbalo... Sed kiu pensas ĉirilate pri ekspluata de infanoj?

La batalon kontraŭ infanlaboro Kailaŝo SATYARTHI konsideras sia vivotasko. En 1980 li ĉesis profesii kiel inĝeniero por tute dediĉi sin al tiu afero. „Dum periodo dudekjara multo ŝanĝiĝis, kaj ne nur en Hindio”, li, la nuna prezidanto de la Tutmonda Marŝo kontraŭ Infanlaboro, konfesis kiam li misiis tra Eŭropo.

Kiam Kailaŝo havis kvin jarojn kaj por la unua fojo iris lernejon, li ekvidis apude samaĝan knabon kiu purigis la ŝuojn de aliaj infanoj. Li malkaŝis sian miron al ties patro, sed tiu same mirigi-

gastamon de popolo ĝisoste mizera kaj malriĉa, ne havanta vivon homindan, futuron kaj perspektivon.

Ni helpis al preskaŭ mil infanoj kaj plenkreskuloj, esperante ke KELI-anoj malavare subtenos la postvojaĝan taskon pretigi, laŭ ofte altaj dioptrioj, centojn da muntumoj. Karaj geagantoj, bonvolu mezuri laŭ la mezuro pri kiu parolas la Evangelioj laŭ Mateo (7, 2), Marko (4, 24) kaj Luko (6, 38). Vortoj, kiujn prizonulo Ivan skribis sub la kruco, sur kiu pendas Jesuo, diranta pri si mem: *Mi estis en malliberejo, kaj vi venis al Mi* (Mateo 25,36).

Kun anticipa danko kaj elkoraj salutoj,

Jacques TUINDER
Mennorode, 4/6 oktobro 2002

te reagis. Neniam iu estis demandinta al li, kial juna knabo devas fari tiun laboron. Kaj lia respondo estis: „Ni naskiĝis por labori!”

Komence Kailaŝo spertis malmulte da simpatio. „Estis malfacile varbi aliajn, kiuj emis pensi pri tiu problemo. Preskaŭ ĉiu opiniis la laboradon de infanoj tre normala”.

Tra la tuta mondo multe pli ol 250 milionoj da infanoj inter kvin-kaj dekkvarjaraj laboradas, el kiuj la pli granda parto loĝas en Hindio, Pakistano kaj Nepalo.

SATYARTHI estas fondinto kaj prezidanto de la Sud-Azia Ligo kontraŭ Infanlaboro (SACCS). Ĝi celas: ‘savi’ infanojn pli malpli sklave laborantajn. „En la daŭro de dudek jaroj ni realigis liberigon al pli ol 52.000 infanoj”.

Ĉi tiuj infanoj sklavadas malproksime de la hejmo, ie en laborejo aŭ fabriko. La gepatroj antaŭe ricevas iom da mono kaj aŭdas la senenhavan promeson ke oni bone zorgos pri ilia infano. „Sed la praktiko estas tute alia, ĉar la infanoj estas kvazaŭ enkarcerigitaj en siaj laborlokoj, kie ili flanke de sklavdeĵori ankaŭ ‘vivas’ kaj dormas. Temas pri labortagoj de inter dek kvin kaj dek ok horoj. Reiri hejmen ne plu eblas. Foje ili estas bataj, foje eĉ katenataj”. Kiam la gepatroj pri tio eksciis, ili povus direkti sin al polico, ĉar tio estas malpermesita en Hindio. „Sed ĝenerale ili ne faras tion, ĉar homoj malriĉaj ne tre fidas policistojn”. Kiam ili petas helpon al SACCS, ekas sekreta agado por liberigi la infanojn.

Homoj de SACCS prenas la gepatrojn kun si. Nur lastmomente ili avertas la lokan registaron. Ili petas, ke akompanu ilin policisto aŭ politikisto. Al la liberigitaj infanoj oni donas tiam oficialan kaj aŭtoritatan dokumenton pri registrado, kiu ebligas al ili aliĝi al tute specialaj pro-

gramoj. La gepatroj ricevas monan rekompencan por povi komerci aŭ por aĉeti bovinon aŭ kelke da ŝafoj.

La organizaĵo konstruis tri kiel hejmon funkciajn centrojn por infanoj. „Ofte ili estas traŭmatizitaj. Ni ofertas instruon al la infanoj kaj klopodas rebonigi difektitan memfidon kaj kreskigi socialan konscion ilian”. Poste ili povas transiri al ‘normala’ lernejo.

Dum la lasta jardeko SACCS organizis en Hindio kaj Suda Azio longajn protestmarŝojn kontraŭ infanlaboro. La tutmonda marŝo okazinta en 1998, al kiu aliĝis mi kaj aliaj lokaj geesperantistoj, fariĝis vera kulmino. Ĝi enkondukis specialan markon por tapiŝoj, por ke la aĉetonta publiko estu certa ke ĉi tie kaj nune ne temas pri infanekspluata. Dume komenciĝis ankaŭ forta kampanjo en la industrio de sportartikloj. „En Hindio minimume dekmil infanoj deĵoras en ĉi tiu industrio por okcidentaj konsumantoj. Ili devas fabriki pilkojn, sed eĉ ne kuraĝas revii pri tio ke ili mem iam futbalos”.

Infanlaboro iom post iom konatiĝas kiel malbono nepre forigenda. Ho, nur tre longos kaj krutos la vojo al la finfina venko... Sed bojkotado kontraŭ iuj produktoj infanmane faritaj povus — sen bona alternativo — konduki al tio kio eĉ draste plimalbonigus la sorton de tiuj geknaboj, ĉar prostituado estas ankoraŭ pli terura formo de ekspluata. Ie kaj tie eble estus pli bone unuafaze ŝanĝi la laborkondiĉojn anstataŭ postuli radikal malpermeson.

Sed ĝenerale tio nur ŝajnas solvo. Ekzemple Hindio. 83% el la plenkreskaj laboristoj ne estas organizitaj; la plej multaj ricevas eĉ ne minimuman salajron, pri kiu ili rajtas. Kiel do aranĝi kontrolon pri la laborcirkonstancoj de infanoj?

Kiel senperforte venki maljustecon?

Ni, kiel homoj, havu kuraĝon, solvi niajn problemojn pere de dialogo kaj intertraktoj. Parolante ni nenion perdas, dum tro multon ni perdas sekve de perforto kaj milito.

En la nuna „Internacia Jardeko por Kulturo de Paco kaj Sen-perforto por la Infanoj de la Mondo” (2001-2010) ni ĉiuj, kiel fratojn kaj fratinojn, staras antaŭ la defio trovi novajn manierojn por forigi la profundajn radikojn de perforto, kaj el niaj propraj koroj kaj el la mondo.

Mairead Corrigan MAGUIRE
(Nobelpremio por la paco, 1976)
tradukis: Jacques TUINDER



Se oni permesas laboron al infanoj, ili estas viktimo transdonitaj al siaj laboradantoj.

Infanlaboro kundependas kun senlaboreco, malriĉeco kaj analfabetismo, malbonoj kun efiko reciproke plifortiga. Nu, laŭ SATYARTHI oni komencu kontraŭbatalante analfabetismon. „Senpaga, deviga kaj bona instruado elementa havigas la ŝlosilon. Ĉi tiu alproksimiĝo estas plej praktika”. Tial la Tutmonda Marŝo kontraŭ Infanlaboro iniciatis — kune kun diversaj help-organizaĵoj — mondvastan kampanjon favore al baza instruado por ĉiu en 2015.

Forigu infanlaboron kaj analfabetismon, kaj tiam oni saĝe batalas kontraŭ malriĉeco! Jen la juĝo de Kailaŝo SATYARTHI.

Jacques TUINDER

NI KORE INVITAS VIN ALIĜI AL NIA 16a EKUMENA KONGRESO RIMINI 2003

Generalaj informoj

En ĉi tiu kongreso ni volas kune kristane vivi, preĝante por plia progreso de unueco inter la gefratoj de Jesuo Kristo. Por pli bona preĝado ni havos la novan preĝ- kaj kant-libron ADORU.

La 16a EEK okazos en Rimini honore al pastro MAGNANI, honora prezidanto de IKUE. Li kreis veran Esperantan preĝejon, kiun Esperantistoj kun intereso vizitas. Post la kongreso pastro MAGNANI emeritiĝos. La 16a EEK estos la kronado de la Esperanta agado de pastro MAGNANI.

El la historio de Rimini. Rimini estas tre antikva, sed oni ne konas la jaron de ĝia starigo. Oni opinias ke ĝia nomo devenas el la nomo de la rivero Armenium, pli poste nomata Marecchia. Dum la kvara jarcento post la Roma-fondo, Rimini estis okupita de Senonaj Gaŭloj, kiuj en ĝi starigis la centron de sia militado. Post 113 jaroj la romanoj forpuŝis la gaŭlojn kaj fondis kolonion en la jaro 268a a.K. Dum la dua Punika Milito Rimini daŭrigis sian obeon al Roma-Respubliko. Dum la komenco de la civil-milito la urbo estis sieĝata kaj difektita.

Estas rimarkinde ke dum la dua Punika Milito, en la jaro 236 post la fondo de Romo, la Konsulo Tito Sempronio Longo transportis sian armeon el Sicilio kaj elŝipiĝis ĉe Rimini.

Dum la 6-a jarcento la urbo estis okupita de Grekoj. En la jaro 538, post longa sieĝo, okupis ĝin la Gotoj. En la jaro 552 ili estis forpelitaj.

De la jaro 567 ĝis la 8a jarcento ĝi estis

regata de Dukoj dependantaj de la greka ekzarko. Dum la 10a jarcento regis la urbon Grafoj elektitaj de la Papo, kiuj pli poste fariĝis sendependaj.

En la jaro 1295 la urbo falis sub la povo de familio Malatesta, kiu regis ĝin ĝis la 15a jarcento per tre lertaj, famaj kaj valoraj princoj.

Ĉi tie oni ne povas prisilenti la kompatindan vivon de Francesca el Rimini, kiu donis instigon al la Dia poeto Dante Aligieri (kies tombo situas en Ravenna) por skribi en sia poemo la plej belan paĝon pri amo (Dia Komedio, Infero, ĉap. 5a).

En la jaro 1503 Malatestanoj vendis la urbon al la Venecia-Senato, kiu en la jaro 1509 donacis ĝin al la Papo. La Papoj regigis ĝin de Prelato ĝis la jaro 1797. En tiu ĉi jaro oni starigis Rimini-n kiel centron de la Rubikona Departemento kun 28 distriktoj kaj 150.000 enloĝantoj. Ekde la jaro 1816 denove la Papo regis la urbon ĝis Marto 1860, kiam oni kunligis ĝin al la Itala Regno.

En la lasta mondmilito, de Novembro 1943 ĝis Julio 1944, Rimini suferis 396 bombadojn kaj ĝin oni detruis 82%-e. La viglaj civitanoj tuj rekonstruis la urbon, sed, bedaŭrinde, sen urba planprojekto, en perspektivo de la kreskanta turismo.

La hodiaŭa Rimini fariĝis ĉefurbo de Eŭropa kaj luksa feriado, dank' al ĝia marborda beleco, al la klimata mildeco kaj ankaŭ al la sincera afableco de ĝiaj loĝantoj. Ili estas 150.000, sed somere por feriado ĉeestas ĝis unu miliono da turistoj laŭ ĝiaj 15-km da marbordo kaj centoj da hoteloj kaj pensiojoj. La 16a Ekumena Esperanto-Kongreso okazos en kvartalo de Rimini, nomita SAN GIULIANO MARE, tute apude de la marbordo.

La plej fama monumentoj de la urbo:

1. La Arkaĵo de Cezaro Aŭgusto, stargita de la Romia Senato kaj Popolo por honori la imperiestron Oktaviano en la jaro, en kiu li estis salutata „Aŭgusto”. Ĉe tiu ĉi arkaĵo finiĝas la konsula strato de Flaminio, kiu komenciĝas ĝuste ĉe la Ponto Milvio en Romo.

2. La Ponto de Tiberio estis konstruata inter 14a kaj 21a jaroj post la naskiĝo de Kristo. Ĉe tiu ponto komenciĝas la konsula strato Emilia, kiu finiĝas ĝuste en Piacenza (prn. Piacenza).

3. La Malatesta Templo, estas la plej signifa renesanca verko de Arkitekto Leon Battista Alberti (*Genova 1404, +Roma 1472). ĝi estis konstruita okaze de la venko de Sigismondo Pandolfo Malatesta super reĝo Alfonso de Napolo (1448).

4. Religie valoras la Templeto (skolo de Bramante, 1518) honore al Sankta Antonio el Padova, ĉar ĝi situas sur la placo, kie mulino surgeniis antaŭ la Plej Sankta Sakramento portita procesie tien de la Sanktulo Antonio de Padova.

Rimini favoras Esperanton:

Atestas tion la ĉeesto en Rimini ekde la jaro 1912 de la mondfama E-pioniro, la franciskana Prof. Patro Modesto CAROLFI ofm (+ 1958), kiu ekkonferencis pri Esperanto kaj vikle agadis kiel prezidanto de la Itala Esperantista Federacio ĝis la jaro 1920, kiam li en Bolonjo fondis kaj gvidis la italan IKUE-sekcion. Lia kunordenano kaj disĉiplo P. Albino CICCANTI (+ 1994) daŭrigis senlace loke, nacie kaj internacie haroldi Esperanton. La Komunumo de Rimini per lia iniciato titolis du stratojn en la stranda centro. Ili nomiĝas Via Esperanto kaj Via L.L. ZAMENHOF. El Rimini oni petis (1994) al la Papo mesaĝi tutmonden en Esperanto Kristnaske kaj Paske kaj ĉi tie oni presis la Roman Meslibron Esperantlingvan (1995). La urbo gastigis du IKUE-

kongresojn (1997 kaj 2000). Per la nuna 16a EEK, la eŭropa kaj globa vokiĝo de tiu ĉi urbo fariĝas ankaŭ ekumena en Esperantio.

La temo de la kongreso estas: Vi estos miaj atestantoj (Agoj 1,8; ADORU 560) salo kaj lumo por la mondo (Mat 5,13-14)

Sub la titolo ADORU aperis en la jaro 2001 ampleksa ekumena preĝ- kaj kant-libro. ADORU estos la libro ĝenerale uzata en la 16a EEK. Posedantoj kunportu sian ekzempleron. Oni povas aĉeti la libron dum la kongreso.

Oni atentu la speciale favorajn prezojn por familioj kaj grupoj. Tio estas la ŝanco, kunvenigi parencajn aŭ konatajn gejunulojn kaj familiojn al nia kristana Esperanto-renkontiĝo. Estas antaŭkondiĉo, ke la gejunuloj kaj infanoj jam antaŭ la kunveno komencis lerni Esperanton. Tion konfirmu antaŭe grup-gvidanto aŭ gepatroj. Dum la kongreso ni donos kurson por komencantoj kun antaŭ-scioj kaj paroligan kurson.

La kotizoj inkluzivas ekskurson al Ravenna kun siaj famaj preĝejoj mozaiko kaj al San Marino, la plej malnova respubliko de la mondo. Post la kongreso eblas du ekskursoj al Loreto kaj al Asisio. Tiuj du postkongresaj vojaĝoj devas esti aldone pagataj.

nome de la Ekumena Komisiono de
IKUE kaj KELI:

Adolf BURKHARDT por KELI
Bernhard EICHKORN por IKUE
kaj nome da la LKK:

Duilio MAGNANI, honora prezidanto
de IKUE



Impresoj de la KELI-kongreso 2002 en Berekfürdő (Hungario). Temo: LIMOJ

Nia vojaĝo al Berekfürdő komenciĝis ne en Nederlando sed en vilaĝo apud la Danubo proksime al Esztergom. Dum unu semajno ni esploris parton de Hungario kaj ĝuis denove la restadon en lando kiun ni jam plurfoje vizitis. Dum nia vojaĝo orienten per aŭto, ni malkovris ke la pejzaĝo fariĝis same ebena kiel en nia lando kaj pli specife en nia regiono. Granda diferenco tamen estis la foresto de fosaĵoj, de bovinoj en paŝtejoj, de la multaj farmbienoj pli proksime unu la alian ol en Hungario. Ni veturis tra malgrandaj vilaĝoj kaj urbetoj kaj finfine atingis la kongresan lokon. Trafis nin la amaso da homoj en la stratoj. La Hungaroj ferias en la vilaĝo pro la saniga akvo.

En la kongresa centro de la Reformita Eklezio ni estis akceptitaj de la tri organizantoj de la Kristana Kongreso: Éva FARKAS, Irén BAGI, Elizabeta KASZAB. La interkona vespero komenciĝis per la bonvenigaj vortoj de la KELI-prezidanto Jacques TUINDER. Ĉiuj estraranoj escepte de unu partoprenis la kongreson.

Éva FARKAS parolis pri la temo de la kongressemajno: Limoj. „En la mondo ŝajne malapasi eksteraj limoj sed aperas bariloj en la animoj kiel antaŭjuĝoj, suspektemo”. La bariloj en la animo estas pli danĝeraj ol la eksteraj. Ses kongresanoj rakontis pri la landlimoj kiujn ili transpasis survojo al la kongreso kaj kion ili atendis de la kongreso.

Éva FARKAS gvidis la vesperan preĝon. Ni estis bonŝancaj ĉar Ernst LEUZE, eklezia muzik-direktoro el Germanio, partoprenis la tutan semajnon kaj li tre ler-

te akompanis nian kantadon. Dum tiu ĉi semajno estis multaj eblecoj por konatiĝi kun la nova kant-kaj preĝ-libro *Adoru*. Estis vera ĝojo komune kanti kaj preĝi helpe de tiu ĉi valora libro.

Ĉiun tagon okazis matena kaj vespera preĝo, komuna kantado, prelegoj, refreŝigaj ekzercoj kaj antaŭ la tagmanĝo estis ebleco ĉeesti la preĝo laŭ Gregoriana metodo. Multaj kongresanoj kontribuis al la interesa programo.

Jaap kaj mi forestis mardon kaj merkredon por vizito al geamikoj en la plej Sud-Orienta parto de la lando kaj ni de-


KONGRESAJ LIMOJ

Sulfura limo,
Nokta muzika limo,
Sunopluka limo,
Matena-luma limo,
Septaga limo,
Hungara lingva limo,
Ukrainia land-limo

Kaj

Senlima graco de Dio,
Senlima nokta babilado,
Senlima hungara ebenaĵo,
Senlima gefrata etoso,
Senlima ĝuo de *Adoru*,
Senlime afabla LKK,
Senlima köszönöm szepter.

Philippe COUSSON



Partoprenantoj de la kongreso dum amika babilado... (fotis. P. C.)

vis vojaĝi hejmen je vendredo mateno tre frue. Mi do nur povas raporti pri kelkaj tagoj el la kongresa semajno.

Dimanĉon gvidis Julia 'SIGMOND la matenan preĝon kaj Britta REHM la vesperan preĝon. Tibor PAPP el Debrecen raportis pri siaj eldonoj kaj sia oficiala Esperanto-instruado en la universitato de Debrecen.

Lundon gvidis Vera TUINDER la matenan preĝon. Philippe COUSSON prelegis pri „la interreligia kunveno en Poitiers”. Posttagmeze rakontis Arne LUNDKVIST pri Anna SANDGREN kaj Esperanto-Misio. En *Adoru* aperis kantoj de la Sveda verkistino Lina SANDELL. Ni kantis kelkajn kantojn de ŝi. Vespere rakontis Irina UDALOVA el Ruslando sprite pri ŝiaj spertoj kun limoj. Ŝi devis plenumi multajn formularojn por akiri vizon kaj farris komplikajn vojaĝon. Mats LANDFORS gvidis la vesperan preĝon.

Ni revenis merkredon antaŭ la vespermanĝo. La kongresanoj ĝuis sukcesplenan ekskurson al Debrecen kaj la Hortobágy. Endel OJASILD el Estonio prelegis vespere pri la temo „Kiel kunvivi”. Bengt Olof ÅRADSSON gvidis la vesperan preĝon.

Ĵaŭde matene okazis la jarkunveno de KELI kaj posttagmeze prelegis Julia 'SIGMOND pri la temo „Religio en historio”.

Philippe COUSSON

Estas paco inter la religioj en Transsilvanio. Vespere okazis la kongresa diservo en la Reformita Preĝejo de Berekfürdő. Gvidis kaj predikis Adolf BURKHARDT kaj kunlaboris Albrecht KRONENBERGER, Sieglinde STAMM, Kazimierz LEJA.

Ĝojiga afero estis la ĉeesto de pli junaj, novaj partoprenintoj kiuj antaŭ ne longe eklernis Esperanton. Ni devis adiaŭi la kongresanojn ĵaŭdovesperon kaj vendredon tre frue ni komencis la longan vojaĝon hejmen. Ni dankis la triopon kun la helpantoj kiuj tiel bone organizis la ĉi-jaran kongreson.

Els VAN DIJK

Kompletigo:

Marde matene okazis lumbilda prezentado pri Sankta Francisko, kun improvizita muziko de Ernst LEUZE, kaj kun legita teksto per Siegfried KRÜGER, SOMHEGYI Zoltan, kaj Ruth VAN PUIJENBROEK.

Poste, Wil VAN GANSWIJK prezentis sian perkoretan kurson, kaj rakontis kial ŝi interesiĝis pri Esperanto. La adreso de la kurso estas <www.esperantokursus.tk>.

Posttagmeze okazis ekskurso al la proksima urbo Karcag, kun vizito al potisto, al muzeoj kaj la la reformita preĝejo. La vesperan preĝon gvidis Ulrike TREUSCH.

Vendrede, post matena preĝo gvidita de BAGI Irén, FARKAS Éva prezentis prelegon pri «Ligite liberaj». En la posttagmezo, D-ro SZEMÓK Balázs prelegis pri siaj spertoj sub la titolo «Ebloj kaj limoj de kuracisto». Vespere estis la tempo por la gaja adiaŭa vespero, kiun konkludis per vespera preĝo Philippe Cousson.

Sabate matene, per pluraj kontribuajoj, finiĝis nia kongreso en solena fermo. Kaj ni disiris, ĝis baldaŭa revido.

PROKOKOLO PRI LA JARKUNVENO DE KELI EN BEREKFÜRDŐ (HUNGARIO)

Jaŭdo 8-08-2002

La prezidanto, Jacques TUINDER bonvenigis la partoprenantojn kaj malfermis la kunvenon. Ni kantis numeron 595 el „Adoru” kaj ni aŭskultis biblian tekston: Mateo 7:24-25. Éva FARKAS kaj Vera TUINDER estis elektitaj kiel kunprotokolantoj.

Funebra memorigo

Sekvontajn membrojn ni rememoris per silenta momento; **Britio:** Beryl TALBOT, Reginald BEDFORD, David FEATHERSTONE. **Germanio:** Willy SCHÄFER. **Hispanio:** Hernande YZAL. **Hungario:** Irene TOLNAI. **Nederlando:** Henk DE HOOG. **Svedio:** Ragnild NILKLASSON, Viola CARLSSON, Siri SJÖSTEDT, Lennart SVENSSON, Ruth GULBERG, Harry PERSSON, Nils JANSSON, Sigurd BERGSTRÖM.

Sekretaria jarraporto

La membroj aprobis la raporton. La sekretario instigis la membrojn sendi al ŝi informojn pri la aktivecoj en ĉies landoj. Pavel POLNICKÝ aldonis kelkajn informojn pri la Ĉeĥa sekcio. Li forsendis *Dia-n Regno-n* kaj kelkfojojn jare li sendis rondsendlerton. Li planas sekcian kunvenon dum la kongreso de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. En la jarraporto estis 2 eraroj: Baumgarten devas esti BAUMGART kaj Somhegy devas esti SOMHEGYI.

Kasista jarraporto

La komputila programo estis tre utila.

La rentumatesto liberigis je la 10a de decembro 2002. La *Estrara Bulteno* ne plu funkcias. Speciale la numerado de la *Estraraj Bultenoj* estas grava. Kiel ni povos revivigi ĝin?

La saldo estas pozitiva dank' al la kotaltigo. Parton de la kapitalo de la dumvivaj membroj transpagis la kasisto al la kuranta kapitalo. Ni ne nur bezonas iun kiu povos administri la Estraran Bultenon sed ankaŭ la librostokon de KELI. Ni nun ne pagis valoraldonan takson sed se Pollando eniros la Eŭropan Union ni devos pagi ĝin.

Fine de la jaro 2001 finpagis la presisto la tutan prunteprenon al KELI. La Adopta Kaso estas bezonata ĉar la membrakotizo ne kovras ĉiujn elspezojn. Ni devas pristudi kiel ni traktu la liberigotan monon de la rentumatesto. La kostoj por la presado de *Dia Regno* ne altiĝis, nur la kostoj de la dissendado. La kasisto estis ankaŭ la matrikulisto.

Raporto de la kaskontrolantoj

Kontrolantoj estis Karl Heinz SCHÄFER kaj Horst HUB. Ili estas pretaj denove kontroli la kasistajn librojn. La jarkunveno senŝarĝis la kasiston. La kontrolado estis turmento, ili devis kontroli ĉiujn valutojn!

Buĝetoj

Por la eldono de la Biblio ni devos depreni kapitalon kaj tio kaŭzos malaltigon de la rentumo. Ni restas ĉe la decido de 500 ekzemplerojn, dume ni atendas oferton de la Biblia Asocio en Londono. Ankoraŭ ne ĉiuj scias pri la altiĝo de la membreco. La buĝetoj estis akceptitaj.

Raporto de la redaktoro de *Dia Regno*

La redaktoro direktis sin kun dan-

kvortoj al la kunlaborantoj kiuj plej ofte ensendis artikolojn. Foje li ricevis plendojn kaj komplimentojn. Kontribuojn oni sendu prefere rete aŭ diskete. Klare tajpita teksto estas enkomputiligebla pere de la skanilo. La redaktoro eksplikis sian labormetodon. La presisto sendas la presprovaĵojn al la redaktoro kiu sendas la tekstojn poŝte al Jacques TUINDER. La redaktoro kaj Jacques ambaŭ kontrolas la tekstojn kaj la redaktoro resendas la tuton al la presisto (Kazimierz LEJA). Ni uzu unikodon por la supersignoj. Kontribuojn por *Dia Regno* oni sendu estonte al la presisto. La plej freŝa retadreso de la presisto troviĝas en *Dia Regno*.

Propono de Kazimierz LEJA: serĉi iun kiu povos kolekti specifan materialon, ekzemple landajn informojn, evangelikajn informojn. Ĉu eblas krei interretan paĝon de *Dia Regno*? Sed ni ne ĉesigu la paperan eldonon.

Esperanto-Misio

La estraro de KELI esploru la taskojn de Esperanto-Misio. Ni starigu komisionon por E-Misio. La estraro restu responsa pri ĝi. Nur malgranda monsumo restos ĉe Erikas LAICONAS. Ni uzu la monon por ekzemple la eldonon de la Biblio, Adoru. Kie restis la adresoj de la iamaj korespondantoj de Esperanto-Misio? La restanta materialo de Esperanto-Misio devas eniri iun arĥivon. Ĉu eblas transporti la tuton al la Reĝa Biblioteko en Svedio? La materialo devas resti alirebla. Bengt-Olof ÅRADSSON kaj Arne LUNDKVIST espereble povos esplori la eblecojn.

Estrarelekto

Siegfried KRÜGER kaj Pavel POLNICKÝ estis reelekteblaj kaj reelektitaj kun danko.

Kongresaj planoj

Britta REHM donis informojn pri la Universala Kongreso en Gotenburgo en 2003. Ŝi estas membro de la loka kongresakomitato kaj respondecas pri la ekskursoj. La Ekumena Kongreso de 2003 okazos en Rimini (Italujo) de la 30a de aŭgusto ĝis la 6a de septembro. Adolf BURKHARDT disdonis aliĝilojn. Pavel POLNICKÝ proponis organizi Kristanan Kongreson en sia lando en 2004. La kongresejo estos Refreŝiga kaj Eduka Centro de sia eklezio en Moravio. La Universala Kongreso estos en 2004 en Ĉinio.

Jacques TUINDER, la instiganto de *Evidente*, petis adopti la okuloperacion de 2 personoj en Moldavio. Ni decidis uzi por tiu celo monsumon el la Adopta Kaso. La kostoj po paciento estos inter 100 kaj 200 eŭro. La 13an de oktobro ricevos la verkintoj de la nova kantkaj preĝlibro *Adoru* (Adolf BURKHARDT, Albrecht KRONENBERGER, Bernhard EICHKORN) gravan kulturpremion en la urbo Aalen.

La prezidanto fermis la kunvenon. Ni kantis el *Adoru* numeron 144.

La estraro de KELI. Inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo: prezidanto: Jacques Tuinder (2003), vic-prezidanto kaj redaktoro: Philippe Cousson (2003), sekretario: Els van Dijk (2004), kasisto: Siegfried Krüger (2005), membroj: Iren Baghi (2003), Adolf Burkhardt (2003), Bengt Olof Åradsson (2003), Pavel Polnický (2005), Britta Rehm (2004), Geoffrey Dorow (2003), Zoltan Somhegyi (2004).

protokolis Els VAN DIJK
kunprotokolantoj:
Éva FARKAS, Vera TUINDER

Aktualaĵoj

- 834 / 62-63 / [Letero] / Tuinder, Vera; Tuinder, Jacques
 834 / 63 / Kiel senperforte venki maljustecon? / CORRIGAN MAGUIRE, Mairead; TUINDER, Jacques
 834 / 72 / Homaj rajtoj kaj devo / TUINDER, Jacques
 835 / 87-88 / Mia animo kredas je io, kion devas nei mia intelektolo! / TUINDER, Jacques
 835 / 89-90 / Esperantistoj konstruas lernejon en Togolando! / TUINDER, Jacques
 836 / 116-117 / Informo pri la inundo kaj la sekvoj por la eldonejo KAVA-PECH [...] / CHRDL, Petro
 836 / 118 / Esperantistoj ekspoziciis en Egmond (Nederlando) / TUINDER, Jacques
 836 / 99-102 / Trapasi limojn / UDALOVA, Irina
 837 / 126-127 / Internacia kampanjo por solidareco kun blinduloj / TUINDER, Jacques
 837 / 127-129 / Karaj gefratoj [ICEVI] / TUINDER, Jacques
 837 / 128-130 / Evidente-prezidanto en moldova malliberejo! / TUINDER, Jacques
 837 / 130-131 / Ili faras pilkojn kaj tamen ne povas futbali... / TUINDER, Jacques
 837 / 131 / Kiel senperforte venki maljustecon? / MAGUIRE, Mairead Corrigan; TUINDER, Jacques

Diversaĵoj

- 832 / 24 / Du etaj riĉaj fiŝkaptistoj / HUSTEK, Christa; TUINDER, Jacques
 835 / 81-82 / Urĝa alvoko de Tutmonda Ekumena Ligo pri la „Ekumena“ / DURANTI, Angelo
 835 / 82 / Tutmonda fabelkonkurso invitas infanojn verki / BULLER, Osmo
 837 / 125 / Ama opinisondo / HARLER, Ed.

Kongreso

- 833 / 43-46 / Ekonu la regionon de nia kongreso! / FARKAS-TATAR, Éva
 834 / 68-69 / Protokolo pri la jarkunveno de KELI, 2001-07-19, dum la Ekumena Kongreso en Zagrebo / REHM, Britta
 834 / 70 / Tagordo de la jarkunveno de KELI, 2002
 835 / 90-93 / Raporto kaj impresoj de la 15a Ekumena Kongreso kaj 5a JET / REHM, Britta
 836 / 103 / Ulrike TREUSCH dum la adiaŭa matenpreĝo de Jacques, Sabaton, [...] / TREUSCH, Ulrike
 837 / 132-133 / Ni kore invitas vin aliĝi al nia 16a Ekumena Kongreso Rimini 2003
 837 / 134-135 / Impresoj de la KELI-kongreso 2002 en Berekfürdő (Hungario)... / VAN DIJK, Els; COUSSON, Philippe
 837 / 136-137 / Protokolo pri la jarkunveno de KELI en Berekfürdő (Hungario) / VAN DIJK, Els

Kristanismo

- 832 / 7-8 / Vojaĝo al la misia domo / WOZNICKA, Jozefo
 832 / 8 / Radio Vatikana
 833 / 27-29 / Esperanto kaj ortodoksa eklezio / BURKHARDT, Adolf
 833 / 29 / Kelkaj eldiroj de la sanktuloj / KUZMENKO, Larisa
 833 / 30 / Esprimoj, eldiritaj de la rusa patriarko Aleksio la dua / KUZMENKO, Larisa
 833 / 30 / Kiel ofte ni devas komuniigi? / KUZMENKO, Larisa
 833 / 31-32 / Pri la vivo de la rusa sanktulo Paisio Veliĉkovskij / KUZMENKO, Larisa
 833 / 32 / Ĉu vi scias? / KUZMENKO, Larisa
 833 / 32 / Eldiroj de sanktuloj pri estroj kaj subuloj / KUZMENKO, Larisa
 833 / 48 / En Rumanio okazos la Eŭropa Kunveno de la Monda Reformita Alianco
 834 / 55-56 / La Remonstrantoj / BERVELING, Gerrit
 834 / 65-66 / Pentekosta Diservo en Friedrichstadt / HANKE, Astrid
 835 / 75-77 / Ortodoksa eklezio, pravoslava eklezio, kaj Esperanto / KUZMENKO, Larisa
 835 / 81 / Katolika bonzo / KAIZ Petro
 836 / 104-107 / La interreligia dialogo / COUSSON, Philippe
 836 / 108-110 / La kredo estas donaco de Dio / SIGMOND, Julia

Letero

- 833 / 33 / Kiu KELI? Kiu Dia Regno? / LAZIAN, Yenovk
 834 / 57-58 / Konsterne / BERVELING, Gerrit
 834 / 58-59 / Dia Regno kaj kristanismo / HANKE, Astrid
 834 / 59 / Ĉu "Ĝi" malaperis? / HOFMANN, Gerhard
 836 / 118 / OSHO-DAVIES, Oluwabunmi Gabriel
 836 / 119 / ZIELONKA, Jozef
 836 / 119 / LAZIAN, Yenovk

Movado

- 832 / 10-12 / ...Rekte, kuraĝe... / CORSETTI, Renato
 832 / 12 / Granda festo en Dolaro
 832 / 12-13 / 19-a internacia festivalo
 832 / 13 / Ilia lingvo estas kulturlingvo
 832 / 13 / Konferenco de naturkuracista asocio! / GONĈAROV, Anatolo
 832 / 14 / Post Fortalezo kaj Gotenburgo, UK iros al Pekino kaj Vilniuso
 832 / 14 / Zamenhofologia semajno ĉe KCE
 832 / 15 / La 14-an de decembro estis lanĉita la retejo „edukado.net“!
 832 / 15-16 / IKUE en Komarnó-fakultato / FRANK, Helmar
 832 / 16 / 6-a sesio de interlingvistikaj studoj / KOUTNY, Ilo-na
 832 / 17 / Hilelisto / SPEKULJAK, Mato

- 832 / 17 / 250 ĉe prelego en Verono
 832 / 18-19 / La kvara internacia fotokonkurso / GORECKA, Halina
 832 / 21-22 / Novjara mesaĝo de via prezidanto / TUINDER, Jacques
 832 / 22 / Novjara saluto de la KELI-kasisto / KRÜGER, Siegfried
 832 / 9 / Ekumena Diservo dum la IFEF-kongreso / CHRDL, Petro
 833 / 33-35 / Pri „Kristana Misio“ / LAICONAS, Erikas
 833 / 36 / Internacia somera kurso en Esperanto-Gården
 833 / 37 / Balta Esperanto-Forumo
 833 / 38-40 / Financa raporto de KELI / KRÜGER, Siegfried
 833 / 41-43 / Sekretaria jarraporto pri la jaro 2001 / VAN DIJK-KUPERUS, Els
 834 / 61 / Fabrizio PENNACCHIETTI kursos pri islamo ĉe KCE
 834 / 61 / Ĵus aperis la 3-a (aprila) nuemro de la revueto „Humanitas“ / SPEKULJAK, Mato
 834 / 64 / „Adoru“ montriĝis bonege servi ankaŭ en interreligia renkontiĝo! / TUINDER, Jacques
 834 / 66 / Germana Ekumena Diservo / BERVELING, Gerrit
 834 / 70 / Esperanta Diservo londona sur la reto / BOURNE, Kevin
 835 / 83-84 / Profesiigo pri esperantologio studente ĉe UAM! / KOUNTY Ilona
 835 / 84-85 / Ĉio estas donacita / TUINDER, Jacques
 835 / 85-86 / Laborplano de la projekto „Ĝemelaj urboj“ / WU Guojiang
 835 / 86 / LIRO-2001 / GORECKA, Halina
 836 / 114-115 / Baltia alternativo / MELNIKOV, Valentin
 836 / 117 / Internacia fotokonkurso / GORECKA, Halina
 837 / 143 / Al ekumena verko la ĉijara Premio FAME... / BRONZETTI, Giorgio; KASPER, Frank
 837 / 143-144 / Karaj geamikoj [Akademio] / CORSETTI, Renato
 837 / 144 / Esperanto ĉe radio en Berlino / MICKLE, Gary

Nekrologo

- 832 / 20 / In Memoriam H.A. DE HOOG / TUINDER, Jacques; HORDIJK, Leen
 833 / 46 / [David FEATHERSTONE] / BOURNE, Kevin
 833 / 47 / [Nils JOHANSSON] / LUNDKVIST, Arne
 834 / 70-71 / David FEATHERSTONE / BURKHARDT, Adolf
 834 / 71 / [Lennart SVENSSON] / LUNDKVIST, Arne
 835 / 93 / Paroĥestro Sigurd BERGSTRÖM / LUNDKVIST, Arne
 835 / 93-94 / Ragnhild NIKLASSON, Örebro / LUNDKVIST, Arne
 835 / 94 / Siri SJÖSTEDT / LUNDKVIST, Arne
 835 / 94-95 / Ruth GULLBERG 1910-2002 / REHM, Britta
 835 / 95 / Harry PERSSON 1918-2002 / REHM, Britta
 837 / 143 / [Hanna LINDÉN] / LUNDKVIST, Arne

Poezio

- 832 / 22-23 / La venonta jaro... / WIESEN, Fred; KRÜGER, Siegfried
 833 / 35 / Amo neniam pasas / TUINDER, Jacques
 834 / 60 / Demandoj...? / BAHRAM-KARIMI, Forugh; TUINDER, Jacques
 834 / 62 / Amo / HERBERT, George; CAYLEY, Michael
 835 / 88 / Lumo aŭ mallumo / KING, Matin Luther; TUINDER, Jacques
 835 / 96 / Ĝi venas eksteren / DE VLAAM, C.; TUINDER, Jacques
 836 / 103 / Ĉe la limo / LANDFORS, Anna
 836 / 120 / Kanto [Kiu petolas] / WOLTERS, Gottfried; KRONENBERGER, Albrecht
 837 / 121 / Neĝas nun ĉie ĉi / EBEL, Eduard; RETZLAFF, Manfred
 837 / 134 / Kongresaj limoj / COUSSON, Philippe

Recenzo

- 832 / 18 / La unua esperanto-simfonio jam havebla kompaktdiske!
 832 / 19 / "Oraj kantoj" aperis / KOKOLJA, Garik
 833 / 35 / Adoru
 834 / 61-62 / Nova libro el (P)ruslando

Teologio

- 832 / 3-5 / Al Timoteo 2 / BERVELING, Gerrit
 832 / 5-6 / Al Tito / BERVELING, Gerrit
 832 / 9 / Pri malespero / Kuzmenko, Larisa
 832 / 9 / Preĝo pri paco de la tuta mondo kaj edukado de la popoloj sur la tero / Kuzmenko, Larisa
 834 / 51-54 / Kiujn genocidojn kaj maljustaĵojn Dio devus malebligigi? / Zecchin, Armando
 834 / 56 / La granda homo kun malnobla komenco / Ōshó-Davies, Olúwábúnmi Gabriel
 834 / 60 / Desiderata
 834 / 66-68 / Pentekosto, Sabaton 18an de majo 2002, Friedrichstadt [Prediko] / Berveling, Gerrit
 835 / 77 / Pri la kristana obeemo / Minervin, Sergio
 835 / 77-79 / En la proksimo de la benita doktoro / Körpöly Kálmán
 835 / 79-80 / Kial ne ĝui la vivon? / Tuinder, Jacques
 835 / 80 / Ĉu vi konas pli belan verbon ol memori? / Tuinder, Jacques
 836 / 110-114 / La homa respondeco estas limigita / Tuinder, Jacques
 836 / 114 / Limoj / van Ganswijk, Wil
 837 / 123-124 / Kie naskiĝis Jesuo el Nazareto? / Rohloff,
 837 / 124-125 / La priskribo de Jesuo en la Apokalipso / de Vos, Philippe



Kotizoj de KELI 2003

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI	16,00 EUR
per libroservo	18,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni »Espero Katolika«pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni »Dia Regno«pere de C.O. de IKUE	10,00 EUR
Prioritata sendado al ekstereŭropaj landoj	+ 3,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj la ricevon de DR; donacoj estas bonvenaj)	Donaco

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi-sube),
2. Poŝtĝire al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam,
kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**
konto-numero en Belgio: 000-1631831-97
Germanio, Köln: 3182 91-509, BLZ 370 100 50
Nederlando: 378964
(el ekster NL aldonu pro bankkostoj 3,50 EUR)
Svedio: 74374-0
Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Poŝtĝire al la KELI-konto 5506132 (Int. Chr Esperant Bond – KELI)
de nederlanda Postbank N.V., adresu tiel:
INT CHR ESPERANT BOND – KELI – S KRÜGER HEILBRONN
(el ekster NL aldonu pro bankkostoj 3,50 EUR)
4. Per via konto ce UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
5. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto
Siegfried Krüger, Dinkelsbühler Str.12, DE-74074 Heilbronn,
tel./fakso +49 (0)7131 162688
6. Per monbiletoj (internacia valuto), senditaj al la KELI-kasisto.

Landaj kotizoj en 2002

Belarusio (vidu ĉe Rusio)	*)
Britio	15 GBP
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006 nome de Fellowship of British Christian Esperantists (FBCE). Kasistino: Diana Richardson, 59 Croft Wynd, Uddington, Glasgow, Skotlando G71 7BJ Tel.: 01 698 816 341	
Bulgario	*)
Peranto: Christo Dimitrov, str. Stracin 16 7300 Kubrat	
Ĉeĥa Respubliko (inkl. Slovak Respublikon)	250 CZK
Peranto: Pavel Polnický, Lesní 150/VI 29001 Poděbrady, Tel.: 324 615 651	
Estonio	*)
Peranto: Endel Ojasild, PK. 24, EE-10502 Tallin Finnlando Poŝta konto n-ro 800027-4306 454 nome de Suomen Kristallinen Esperantoliitto. Kasistino: Soili Salminen Kivikatu 8 C 51, 15700 Lahti, Tel.: 03-781 7637	
Francio	24,87 EUR
CCP n-ro 10456 15 U Paris, nome de Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL). Kasisto: Philippe Cousson 26 Rue de Pré Ventenet, FR-86340 Nouaillé-Maupertuis Tel.: 05 49 468021	
Germanio	24 EUR
Evang. Darlehnsngenossenschaft Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37 nome de Ökumenische Esperanto-Liga e.V. Kasistino: Astrid Hanke, Am Friedrichshain 37, 25980 Westerland/Sylt Tel.: 04651 5510, Fakso: 04651 21963	
Hungario	*)
Peranto: Irén Bagi, Baross u. 54/B.II.8, 1201 Budapest Tel.: 01 283 6566	
Japanio	20 EUR (rekomendite + 5,50 EUR)
Peranto: Seiziro Kawamura, Kiyomizo-gojo 702, yamadacho 501, Higashijama-ku-Kyoto 605	
Kazaĥstano (vidu ĉe Rusio)	*)
Korea Respubliko	20 EUR (rekomendite + 5,50 EUR)
Peranto: D-ro Puramo Chong, Kwangmyong-Shi Kwangmyong 2 dong 50-5, Kyongki-Do, Sud-Koreio 423-012	

Latvio *)

Peranto: Valdis Gulbis, Lielá iela 1 dz. 2,
Valdemárpils Talsu raj, LV-3260

Litovio *)

Peranto: Erikas Laiconas, p/k 165, 3000 Kaunas, Tel.: 370 7 222131

Nederlando 24,54 EUR

Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75 nome de Chr. Esperanto Verg. KUNE
Kasistino: Gerda Dercks, Molenstraat 20, 7607 AL Almelo
Tel. kaj faksilo: +31(0)546 819 403, Fakso: 0546 819 403

Pollando 30 PLZ

Peranto: Kazimierz Leja, poŝtfako 59, 41-250 Czeladź
Tel.: +48(32) 265 00 38

Rumanio *)

Peranto: Maria László, C.P.202, 4800 Baia Mare
Tel.: 062 426182

Rusio (inkl. Belarusio, Kazahstano kaj Ukrainio) *)

Peranto: Larisa Kuzmenko, Kuŝvinskaja 25 A, 622013 N. Tagil,
Sverdlovskaja Obl. Rusio

Slovaka Respubliko (vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko) *)

Svedio 200 SEK

Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-o nome de Kristliga Esperantoförbundet.
Kasisto: Bengt-Olof Åradson, Östra Häggviksvägen 3, 236 32 Höllviken
Tel.: +46(0)40451931

Svislando 20 EUR

Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu supre)
Ukrajnio (vidu ĉe Rusio) *)

Usono 20 USD (rekomendite + 5 USD)

Peranto: Jerald T. Veit, 3578 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
Oni sendu ĉekon au poŝtmandaton al la peranto.

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto



Preparis:
Siegfried KRÜGER, kasisto

Al ekumena verko la chijara Premio FAME de Urbo Aalen en Baden-Württemberg

Ĉijara Premio FAME, kiu laŭ volo de la fondinto estas destinita al iniciato, kiu favoras alproksimiĝon de popoloj, estas asignita al eldona produkto t.e. al verko titolita „Adoru”, kolekto de pli ol 900 liturgiaj kantoj kaj preĝoj de diversaj religioj, kaj transdonita la 13an de oktobro 2002 ĉe la salono de la urba biblioteko de Aalen de la urbestro Ulrich PFELFLE al aŭtoroj: Adolf BURKHARDT, Bernhard EICHHORN kaj Albrecht KRONENBERGER.

La aparteco de la evento estas, ke la aŭtoroj verkis la kolekton en la internacia lingvo esperanto, kiu laŭ asertoj de multaj katolikaj kleruloj estas la moderna latino de la Eklezio. Lasttempe fakte aperis libro de D-ro Ulrich MATTHIAS: „Esperanto, das neue Latein der Kirche”, kiu rondiris tra la mondo kaj la subtenantoj de esperanto estas kuraĝigitaj de la fakto, ke la Papo, samlandano de Ludoviko ZAMENHOF aŭtoro de la planlingvo, ĉe la Paska kaj Kristnaska benoj adresas mesaĝon ankaŭ en esperanto.

Tamen, kiel asertas S-rino Anny HARTWIG, prezidanto de la esperanto-asocio de Nürnberg, urbo en kiu publikigis en 1889 la unua gazeto en esperanto, ĉeestanta la ceremonion, „Esperanto estus egalrajta solvo de la lingva problemo ankaŭ por la Eklezio sed ekzistas tre multaj pastroj, mi tion spertis persone, kiuj, ankaŭ pro manko de korekta informo, ne estas sentemaj al lingva egalrajteco de popoloj kaj opinias ke la Eklezio jam havas internacian lingvon — la anglan”.

El Aleno raportis Giorgio BRONZETTI kaj Frank KASPER

Karaj geamikoj,

la celo de ĉi tiu mesaĝo estas memorigi vin pri la ekzisto kaj bona funkciado de servo de la Akademio de Esperanto.

Temas pri la tiel nomata Konsultejo de la Akademio. Se vi havas lingvan dubon, ne mem solvu ĝin. Antaŭ ol decidi pri la plej bona solvo por vi, demandu la Akademion per mesaĝo al la direktoro de la Konsultejo, Stefan MAUL, <smaul86150@aol.com>.

Akademianoj, kiuj kunlaboras kun la Konsultejo, rapide debatos la peton rete kaj vi rapide ricevos la respondon.

La servo estis uzata dum la pasintaj jaroj en ĉi tiu maniero ĉefe de esperantlingvaj ĵurnalistoj, kiuj troviĝis antaŭ la neceso nomi tre lastatempan aĵon aŭ afezon.

La servo, tamen, funkcias ankaŭ laŭ la tradicia maniero, per letero al

Stefan MAUL
Pferseer Str. 15
DE-86150 Augsburg
Germanujo

Nekrologo

Hanna LINDÉN mortis, preskaŭ 99-jara. Kiel juna ŝi translokiĝis al Stokholmo kaj laboris en bakejo kune kun Astrid Ljungberg. Ŝi studis esperanton sub gvido de Anna ALAMO kaj iĝis membro de KELI jam en 1935. En Stokholmo ŝi estis membro de Immanuel-skyrkan, SME. En 1997 ŝi petis min forstreki ŝin kiel membro de KELI.

La entombiga ceremonio okazis la 6an de septembro 2002 en la preĝejo de Östervåla.

Arne LUNDKVIST

Esperanto ĉe radio en Berlino

La berlina Radio Multikulti hodiaŭ matene de la 8.05 ĝis la 8.20 prezentis 15-minutan elsendon de Tina HOLT-BORN pri aplikado de Esperanto ĉe kristanoj de Berlino kaj tutmonde. Radio Multikulti parte servas per etnolingvaj elsendoj la bezonojn de enmigrinto-komunumoj en Berlino kaj parte traktas germanlingve temojn de interkultureco.

Intervjuitaj estis la evangeliaj pastoroj Martin GESTRICH kaj Peter BÄß, kaj la IKUE-aktivulo Hans MOSER, ĉe muzika akompano de kelkaj eroj el „Bela revo” de Anjo Amika. Aŭdiĝis sonfragmento registrita ĉe junulara grupo lernanta Esperanton ĉe Martin GESTRICH.

Tuŝitaj estis i.a. ĉi tiuj punktoj:

- la estiĝo de la lingvo
- la valoro de egaleca komunikado, kiu ne donas eksterordinaran avantaĝon al unu parolanto-grupo, kiel ĉe etnaj lingvoj internacie uzataj



Kaj en tiu kazo oni ricevas respondojn per letero. Bonvolu utiligi la servojn de la Akademio de Esperanto.

Amike

Akademio de Esperanto
La estraro

Renato CORSETTI, Via del Castello, 1
IT-00036 Palestrina, Italujo
renato.corsetti@uniroma1.it

- la fondiĝo de IKUE kaj KELI
- la apero kaj enhavo de „Adoru”
- la uzo de Esperanto ĉe Radio Vatikana kaj fare de la Papo (kun sonfragmento el lia paska saluto)

— la partopreno de Esperanto-parolantoj ĉe ekleziaj foiroj en Germanio

- la ekumenisma engaĝiĝo
- la agado de la Laborrondo de kristanaj esperantistoj en Berlino, kiu prepariĝas por partopreno en la venontmaja evangelika eklezia foiro en Berlino

— la problemo de ekzaltitaj esperantistoj, kiuj misias, kaj la eblo troigi la Esperanto-engaĝiĝon ĝis la punkto, ke ĝi fariĝas mem kvazaŭreligio

— la ekzisto de sektoj, malamikaĵoj kaj dubindaj ideoj ankaŭ inter esperantistoj

— la nekonvinkiteco de la intervjuitoj pri la iama definitiva venko de Esperanto kontraŭ la angla

— la valoro de Esperanto kiel liber-tempa okupiĝo kaj la konvinkivo de la baza ideo malantaŭ ĝi

— la eblo pli informiĝi en la reto, komencante ĉe www.esperanto.de.

Al mi persone plaĉis, ke la intervjuitoj ne evoluigis nekonvinkan scenaron de ĝenerala tutmonda adopto, sed elstarigis la praktikan uzadon de Esperanto en sia speciala medio.

Kun amikaj salutoj
Gary MICKLE